## LIBERPENSULA ANGULO

**Moderna humanismo en Nederlando.**

En la mezopoko la du plej altaj virtoj estis humila, rezignacia akcepto de la vivo kun ĉiuj ĝiaj mizero k dependeco, k blinda obeado al la pastraro. Laŭ la tiama vivkoncepto la homo estis senpova subulo, sklavo de la dieca spirito, kiun sur la tero reprezentis la pastraro. Plene oni dependis de la dia pardonemo, akirebla ree nur pere de la pastraro. Dum mltaj jarcentoj oni vivis en la konvinko, ke laiko, tio estas ne-pastro aŭ ne-monaĥo, en si mem havas nenion propran.

Sed ŝanĝiĝis la tempo. En kavalir-medio, iagrada sendependa de la pastraro, vekiĝis propraj etikaj normoj, pri heroeco, kavalira honoro k romantika virinkulto, kvankam en ilia reala vivo regemo k krueleco ofte superis pli mildajn homajn sentojn.

Aliflanke iom post iom estiĝis burĝaro, eĉ komenciĝanta kapitalismo. La vojaĝoj de Marko Polo, krucmilitoj k similaj malfermis al Eŭropo la orientan mondon. En Italio forte evoluis komerco k navigado, arto k literaturo, en Hispanio floris maŭra kulturo, en Flandrio prosperis industrio, en Anglio ekmontriĝis demokratiaj ŝtatideoj, Pariza universitato Sorbono fariĝis scienca centro. Mistikuloj malkovris, ke propraj internaj spertoj povas havi grandan valoron por la propra spirita vivo, se oni nur liberigas sin de pastrara devigo, ke propra simpla vivo, memstare k sendogme spertita, havas pozitivan valoron por la koncerna homo. Francisko de Asizi deklaris, ke estas pli noble privivi Kriston en la koro ol plenumi la ekleziajn ritojn.

Pli k pli la instruado ĉe la universitatoj k specoj de mezgradaj lernejoj venis en la manojn de laikoj, el kiuj pluraj instruis, ke pli valoras por la homo obei al sia homa racio ol al hierarkiaj ordonoj. Verŝajne en tio ankaŭ influis la malmorala vivkonduto de multaj ekleziuloj, gemonaĥoj k pastroj, inter kiuj altrangaj.

La italo Petrarka, la patro de l' humanismo, estis la unua, kiu konscie emfazis la homan valoron, k kontraŭstaris la vivnean tendencon de la kristanismo, laŭ kiu nur postmorta ekzistado havas esencan valoron; li pledis por pristudo de grekaj k romanaj filozofoj, por revalidigi iliajn humanajn ideojn.

Alia itala reprezentanto de la frua humanismo estis Valla, serĉanto pri vero, kiu, laŭ li, estas trovebla same ĉe la ne-kristanaj grekoj k romanoj kiel en la kristanismo. Forte li akcentis la respondecon, kiun ĉiu havas koncerne sian moralan vivon; senindulge li kritikis la konduton de tiuj, pastroj k humanistoj, kiuj neglektis tiun respondecon. Nur pene li evitis inkvizician mortigon.

Ne estas do mirige, ke la burĝaro estis influata de ĉi tiuj ideoj. La celo en la vivo fariĝis klereco, sinefektivigo, memstareco.

La renesanco evoluis plu. Pro la malkovroj de Kolumbo k Vasko da Gama la mondo ree pligrandiĝis, k kune kun ĝi plivastiĝis la spirita horizonto. La itala arto atingis zeniton sub homoj kiel Leonardo da Vinci, Mikael-Anĝelo k Rafaelo; k ili elmontris ne nur religiajn temojn, sed ankaŭ pure homajn sentojn, k kvalitojn, same kiel germanoj Holbejn k Dürer; la pres-arto diskonigis sciencon k literaturon.

Venis novaj pensuloj, Rodolfo Agricola, Erasmus, Thomas More, kiuj konsciigis, ke la spirita vivo, kiun oni antaŭe ankoraŭ konsideris superhoma, estas tipe homa! La homo estas aŭtonoma, morala estaĵo, kapabla memstare serĉi k trovi la veron. La homo vivas ne nur por ricevi sian rekompencon en postmorta vivo, sed li vivu nun surtere en kiomeble plej granda feliĉo k libero. La homo konsciiĝis pri sia digno!

Ĉi tiu humanismo tamen estis k restis religia ismo. Nedisigeble ĝi estis ligita al la religio, al la kredo de la katolika k kelkaj formoj de la ĵus estiĝinta protestanta eklezio. Nur la granda Ĝordano Bruno, kies astronomiaj ideoj en la pasinta jarcento montriĝis profete veraj, predikis ian panteismon; laŭ li la kosma konsistigo materio, mondanimo k intelekto estas unu k samtempe la tuto. En jaro 1600 li trovis la morton sur la brulŝtiparo. Fakte tio estis la fino de la humanisma evoluo en la katolika mondo. La jezuitoj grandparte prenis al si la instruadon k la spiritan gvidon. En la mezo de la deksesa jarcento Koperniko estis malkovrinta, ke la suno ne turniĝas ĉirkaŭ la tero, sed inverse la tero kun aliaj planedoj ĉirkaŭ la suno. Kaj kredeble estis ankoraŭ aliaj tiaj sunsistemoj kun vivantaj estaĵoj. Tio ja tute renversis la eklezian mondbildon, ĉe kiu la tero estis la kosma kernpunkto k la homo la esenca celo de la kreado. En la jaro 1616 la pastraro devigis Galileon malkonfesi siajn dirojn pri la vereco de la Kopernika sistemo.

En la sekvintaj jarcentoj venis novaj pensuloj, Kartezio (Descartes), Spinoza, Voltaire, Kant, Hegel k aliaj, kiuj liberigis k sendogmigis la pensadon de la homaro k pro tio konsiderinde pliprofundigis la vivkomprenon. La franca revolucio senigis milionojn de iliaj katenoj. Kaj tiel venis la deknaŭa jarcento, matura por la elvolviĝo de la laborista klaso, matura por la socialismo. Tamen en la unuaj jardekoj la forto de la batalo devis esti koncentrigata al plibonigo de la materia ekzistado de la popolo, tiel ke por pli altaj, spiritaj celoj provizore ne estis loko. Tio ofte kaŭzis la miskomprenon, almenaŭ la denuncon, ke la socialista batalo estas materialisma; tamen esence ĝi estis neniel tia. Konstruonte domon oni unue faras la fundamenton; tiaj fundamentoj ja ne estas celo, sed nur necesa bazo por plua konstruo. Tiel ankaŭ la materia plibonigo estis nepre necesa por la posta spirita kresko, kiu cetere jam en k per la alia komenciĝis. Fono k impulso por la socialista batalo estis la sopiro al libereco, justeco, respondeco k aliaj moralaj valoroj. Pli intensa batalo por ĉi tiuj valoroj konserviĝis por la dudeka jarcento.

Dume plenumiĝis alia procedo, dum la pasintaj cent jaroj k precipe dum la lastaj kvindek jaroj. Antaŭe la grandega plimulto de la homoj en la okcidenta mondo sentis sin sekura, sendanĝere konservita en la eklezio, ĉu en la katolika, ĉu en unu el la multaj sektoj de la protestanta. Sed iom post iom ili forfremdiĝis de ĝi, la eklezio perdis la firman kapton, kiun ĝi havis ĉe la homaro. Por tiu ĉi fenomeno estas pluraj kaŭzoj; la pliklerigo k sendogmigo de la homoj, la influo de la naturscienco, kiu igis la homojn pensi k rezoni pli ekzakte, la fakto, ke la eklezio predikante humilan rezignacion staris en la servo de la kapitalismo, la fakto, ke ĝi ignoris sociajn misuzojn k ficirkonstancojn. Eble estas pliaj, kiujn ni nun ne priesploru. Sendube la negativiga influo de du mondmilitoj ankaŭ efikis en tio.

La popolsumigo en Nederlando antaŭ du,tri jaroj, montris 17 procentojn, kiuj ne apartenas al iu eklezio. En la suda parto de la lando, pleje kampara, tiu nombro estis malpli alta, en la grandaj urboj pli alta, en Amsterdamo 43 procentoj. Sed tiuj ciferoj eĉ ankoraŭ ne donas ĝustan bildon; reale la nombro de tiuj, kiuj ne plu estas ligitaj al eklezio, estas konsiderinde pli granda. Multaj menciis apartenon al eklezio pro rutino, pro indiferento, pro instigo aŭ „komplezema helpo" de koncerna oficisto aŭ pro timo konfesi al si mem, ke oni ne plu apartenas al la eklezio.

Parton de ĉi tiuj dek sep procentoj formas tiuj, kiuj konscie ne apartenas al iu kredo, kiuj ne povas akcepti religian dogmon aŭ koncepton, k kiuj plejgrandparte trovas en si mem la fonton k la forton por vivi laŭ etikaj normoj.

Sed aliflanke estas granda nombro, kies membroj ne apartenas al eklezio pro indiferento pri iu ajn spirita afero, pro ne-

**Pri „mallongaj komentoj de realisto"*)**

Lucien Laurat opinias, ke mi vivas en la luno, sed liaj mallongaj komentoj montras, ke li mem vivas en la 19-a jarcento, k same kiel Rip Van Winkle li dormas, dum ĉio ajn ŝanĝiĝas.

En 1776, Adam Smith skribis pri labordivido, k dum la proksima jarcento ĉiuj ekonomiistoj, inkluzive de Karl Marks, akceptis la doktrinon, ke nur tutmondskala labordivido povas pligrandigi la produktopovon de la homaro.

La rezultaĵojn de tiu doktrino ni vidas dum la 20-a jarcento, k la gajnintoj de tiu pligrandiĝo estas nek la industriaj landoj kun malpura atmosfero k malfreŝa nutraĵo, nek la terkulturaj landoj kun malriĉeco k ŝuldo, sed la financaj institucioj, kiuj regadas la mondkomercon.

Tiuj financaj institucioj iam malestimitaj kiel uzuristoj nun estas tiel riĉaj k potencaj, ke ili celas regi la tutmondon. Pro tio ili subtenas Eŭropan Unuiĝon, Federacian Unuiĝon, la Unuigitajn Naciojn, la Atlantikan Traktaton, la Planon de Ŝuman, ktp.

Kontraŭ tio ni devas nin gardi, ĉar Tutmonda Registaro nuntempe devos esti despota, k povos regi la homaron nur per devigo. Antaŭ ol ni revas pri Tutmonda Registaro, ni devus ŝanĝi la ekonomian sistemon, por ke ŝuldo estu forigita k plivastiĝo de merkatoj estu ne plu necesa. Unue, la bazaj aferoj. Socikredito savos la mondon.

*W. Townend, prezidanto de TASK.*

*) Vidu n-ron de junio.

kredo al iu ajn spirita ideo aŭ idealo, pro nihilismo, pro cerba malpleno. Inter tiuj grupoj estas tre multaj, kiuj sendirektile naĝadas sur la vivomaro; facile ilin kaptas demagogoj, facile ili viktimiĝas al politikaj ideologiaj fi-gvidantoj, facile ili kredas je belsonaj k belŝajnaj promesoj. Kiel ajn oni povas juĝi pri fidindeco de eklezi-uloj, kiuj senrezerve sekvas siajn religiajn gvidantojn, certe estas, ke ĉi tiuj grupoj sen interna gvido k sen ekstera ligiteco povas formi danĝeron por la kultura k socia vivoj de la lando.

## II

Dum pluraj jardekoj jam ekzistas en Nederlando unuiĝo de liberpensuloj „De Dageraad" (La Tagiĝo). Mi ne scias, kiom da membroj ĝi havas, sed ĝia influo en la lando ne estas granda, precipe ne en la lastaj jaroj.

Tuj post la dua mondmilito kelkaj influhavaj nederlandaj ekster-eklezianoj (por ne kaŭzi intermiksiĝon mi nun prefere ne nomu ilin liberpensuloj), kiuj sentis sian respondecon k ne ŝatas aliĝi al „De Dageraad", kunvenis por priparoli kio estas farenda ĉi-rilate. Ili decidis fondi unuiĝon. Motivoj por tia fondo estis:

a: unuigi la konsciajn ekster-eklezianojn por, interŝanĝante k pritraktante ideojn, pliprofundigi la vivkomprenon k tiel pliriĉigi la vivon;

b: en pli vasta rondo atesti pri la propra koncepto, se eble inter aliaj ekster-eklezianoj disvastigi ĝin k kie necese defendi ĝin;

c: per reciproka spirita apogo k komuna agado praktiki humanismon en la ĉiutaga vivo;

ĉ: akiri egalrajtigon por ekster-ekleziaj ideoj k homoj kun tiuj de ekleziaj;

d: iom post iom doni kiomeble plej grandan gvidon al la grupoj de ne-konsciaj ekster-eklezianoj.

La unuiĝo stariĝis en februaro 1946. Antaŭe iuj religiuloj ofte titolis la homojn ekster la religio malaprobe aŭ malestime humanistoj. Nu, tiun insultnomon la fondintoj elektis kiel honoran nomon, k tial ili baptis la unuiĝon „Humanistisch Verbond" (Humanisma Ligo). Pri ĝiaj premisoj k principoj mi diru jenon.

Humanismo estas viv- k mondkoncepto, kies elirpunkto ne estas agnosko pri la ekzisto de persona dio. Laŭ ĉi tiu formulo povas aliĝi al la ligo tiel konvinkitaj ateistoj en la historia senco de la vorto, kiel homoj, kiuj, kvankam sendogmeme, inklinas nomi la tutaĵon de kosmaj fortoj dio. Sed la aldono de la vorto „persona" ekskluzivas, ke al tia diaĵo povus esti atribuataj kvazaŭ homaj ecoj k kvalitoj kiel konscia gvido, justeco, amo, rekompenco k puno, ktp. Laŭ tiu formulo la ligo ne neas la ekziston de dio. Laŭ agnostikisma vidpunkto oni ne povas pruvi ekziston de iu dio, sed same ne ĝian ne-ekziston. Ŝajnas al mi, ke en ĉi tio kuŝas unu el la diferencoj inter la Humanisma Ligo k la liberpensula unuiĝo „De Dageraad", kiu, kiom mi scias, pozitive neas tiun ekziston. Plue la liberpensuloj kontraŭbatalas la religion, almenaŭ la eklezion, dum la humanistoj neniel tuŝas ĝin, direktante sin al jamaj ekster-ekleziuloj k klopodante igi ilin konstrui propran pozitivan vivkoncepton.

Tamen, kiel jam dirite en klarigo, en „S-ulo" 554 sub la sama rubriko, ne ekzistas rivaleco inter la du unuiĝoj; kontraŭe, kie tio estas ebla, ili amike kunlaboras. Espereble iam tiuj du parencaj unuiĝoj kunfandiĝos.

La humanista vivkoncepto baziĝas sur respekto al la homo, kiu ne estas senmakule nobla k pura (kiel kontraŭuloj ofte riproĉas al la ligo), sed kiu certe ankaŭ ne estas nur pekema, kiel la kristanismo prezentas lin; respekto al la homo, kiu dum sia tuta vivo batalas kontraŭ siaj malpli altaj inklinoj k instinktoj, sed kiu ankaŭ konscias pri la bono, kapablas fari la bonon k celas al ĝi, al vera homeco. La homo, kiu konscias pri la respondeco, kiun li havas en la vivo koncerne sin mem k koncerne siajn kunhomojn, kiu akceptas tiun respondecon k klopodas en la praktiko vivi laŭ tiu respondeco.

Tia vivkoncepto do ne estas teoria formulaĵo, nek rigida principo, sed vivsinteno, kiu donas direkton en nia vivo k kiu manifestiĝas en ĉiuj agoj k preterlasoj. Kaj ĉar ĝi ne emfazas la pekemon k la pekadon, sed kontraŭe akcentas la kapablon al la bono, la celadon al la bono, ĝi efikas impulse, plialtige, noblige. Eble kuŝas en ĉi tio la plej grava, historia tasko de la moderna humanismo.

Respekto al la homo implicas respekton al la sincera konvinko de aliaj pensantoj. Humanisto do estas tolerema. Tiu toleremo estas io tute alia ol indiferento, malforto k cedemo, ĉar ĝi estas aktiva. Kie tio estas dezirinda aŭ necesa, li metas sian konvinkon flanke de aŭ kontraŭ tiun de aliaj. Kaj, kiel li respektas la sinceran konvinkon de aliaj, li postulas nepre la saman respekton de la aliaj por la same sincera konvinko de la humanistoj. Por tio estas en Nederlando, kiel kredeble ankaŭ alilande, ankoraŭ vasta kampo de batalo.

Humanismo konsideras la homon specifa parto de la kosma tutaĵo, estaĵo konscia pri tiu ereco k pro tio sentanta sin ligita en la tutaĵo k kunrespondeca pri ĝi. Ĝi konsideras la homon portanto de spiritaj k etikaj valoroj, de normoj pri ekz. bono, vero k belo. Tiuj normoj certe ne estas arbitraj, sed superindividuaj, kvankam ne imageblaj sen la homa konscio, ili estas dinamikaj kun la homara evoluo. Ĝi konsideras la homon kreanto de k partoprenanto en spiritaj valoroj, kreanto de artaj k sciencaj valoraĵoj, jen altnivelaj, jen pli simplaj, k kapabla partopreni en ĉi ĉio; tiel li estas krom natura ankaŭ kultura estaĵo, povanta k bezonanta kontentigi siajn kreajn, artsoifajn k sciencajn impulsojn.

Superhoman, dian revelacion pri moralo, etiko, mondbildo, eternaĵo k. s. la Humanisma Ligo kompreneble ne agnoskas. La fonton de sia morala konscio, de sia konscienco, ĉiu trovas en si mem, k kiel ni jam diris, tio neniel estas arbitra. Kiel tio estas ebla, tio estas kredeble unu el la misteroj de la vivo, pri kiuj la humanismo modeste konfesas, ke ni ne aŭ ankoraŭ ne povas doni solvon. La humanisto ja formas al si mondbildon, bildon de la tutaĵo kun ĉiuj ĝiaj aspektoj k fenomenoj, materiaj k spiritaj, klarigeblaj k neklarigeblaj. Tiun mondbildon li formas al si per spertado, pensado, intuicio, studo, rezonado; li formas tian bildon, ke ĝi ne venos en konflikto kun la racio. Kvankam tio ne signifas, ke li komprenas ĉion, certe ne; ja estas ankoraŭ multegaj misteroj, kiujn la homoj klopodas solvi, sed ofte okazas, ke malantaŭ solvita mistero kaŝiĝas deko da novaj sekretoj. La humanisto kontentiĝas nur per tiaj solvoj, kiuj ne kolizias kun aliaj, jam ekzakte pruvitaj veroj, solvoj do, kiuj harmonias kun la cetero k pro tio estas raciaj. Tamen ni konsciu, ke jam pruvita klarigo ofte bezonas korekton aŭ eĉ anstataŭigon; tion la humanisto ja akceptas. Lia mondbildo estas kune kun la vivo ne rigida, ne statika, sed dinamika.

La Humanisma Ligo rekonas la grandan signifon, kiun la biblio havas por la okcidenta kulturo; ĝi konscias pri la granda valoro de pluraj ĝiaj ideoj. Sed same k samvaloraj la humanisto konsideras ideojn en verkoj de aliaj geniaj pensuloj, antikvaj k modernaj, de la oriento k de la okcidento.

Humanismo postulas por la homo rajton je persona libereco. Tio kompreneble neniel signifas senbridecon; neniel la homo rajtas malutili siajn kunulojn. Sed ĝi signifas, ke la homo rajtas vivi laŭ sia konscienco, ke li sub propra respondeco rajtas evolui laŭ sia individua naturo al plena homeco, ke li havu la eblon k okazon en la vivo disvolviĝi al tia homo, kiu ĝerme estas en li, ke li povu fariĝi li mem. En tia disvolviĝo la homo povas esti bremsata de internaj k de eksteraj kaŭzoj. La internaj pasiojn k instinktojn li kontraŭbatalu mem, eventuale helpate de aliaj; la eksteraj cirkonstancoj estu tiaj, ke ili kiomeble malmulte malhelpu la individuon. Sen ia dubo demokratia reĝimo estas por tio plej bona. Egaleco inter la homoj ne ekzistas, denature ili diferencas; sed egaleco estu inter ŝancoj k ebloj por senescepte ĉiuj homoj, elkreski al interne libera, feliĉa, harmonia homo kun pozicio en la socia vivo konforma al liaj talento, karaktero k forto. La humanismo taksas demokratian reĝimon laŭ la mezuro, en kiu ĝi donas al la individuoj eblon por tiu evoluo.

Ankaŭ por la ceteraj facetoj de la socia vivo la humanismo postulas plenan juston. Kion tia postulo ampleksas, mi ja ne bezonas klarigi ĉi tie. Same validas la postulo, ke ĉiu havu rajton, eblon k povon partopreni en arto, scienco, kulturo.

Jen grandlinie la fundamento de la nederlanda Humanisma Ligo. Ĝi ekzistas nun ses jarojn en plena aktiveco. Ĝi nombras ok mil membrojn, sed ĝia influo en la lando estas konsiderinde pli granda ol supozigus tiu relative malgranda membronombro.

*R. Israëls.*

**SENNACIECA REVUO 1952**
Tiu ĉi ampleksa ilustrita kajero estas ankoraŭ mendebla al SAT - Parizo, K-do v. Essen, Roterdamo, aŭ al la Libro-Servoj de la LEA-oj.
Prezo: 200 f.f., 2 gld. aŭ ekvivalento.